


En Ĝirondio de la 2a ĝis la 7a de majo 2018

Merkredon la 2an en la koncertejo Simone Signoret ĉe la urbodomo de Cenon (33150)
Ĵaŭdon la 3an en la bordoza laborborso (44 korso Aristide Briand – 33000 Bx) (*urba tramo*)
De vendredo ĝis dimanĉo en la Kastelo de la Diablo (88 korso Victor Hugo en Cenon)
Sabaton la 5an vespere en la vilaĝa festsalono Bellevue de Cambes (33880) (*speciala buso*)



PARTOPRENU! Tio signifas venu aktive kunvivadi kvin neforgeblajn tagojn.

Riĉenhava
kultura
programo!

ESPERANTO-GIRONDE sperta organizema asocio bezonas vin por festi sian 50an jaron.

Ĉu vi hezitas, ĉar vi timas enuon? Vidu do la mozaikan programon: kunkantado kun nepapagaj artistoj, riĉenhavaj debatoj, neordinaraj prelegoj, publikaj koncertoj, serioza intersindikata kleriga tago, esceptaj vizitoj. Aŭ ĉu timas vi tro altajn kostojn? La kotizo kaj manĝoprezoj dorsflanke indikitaj kvietigos vian monujon. Tio dank'al libervolaj kontribuonto!

Aktive partopreni signifas ne nur esprimi sian opinion dum debato, kunkanti sed ankaŭ kunhelpi en la praktikaj ĉiutagaj taskoj: manĝopreparado, telerlavado, salonoreordigado, ktp. La etoso estu partigo de la laboro en plaĉa harmonio kiel tiu de kunplezuro dum la distraĵtempoj.

Alvoko al
bonvolemaj
helpontoj!



Pri manĝoj: Ilin preparos loka publika kuirejgo, kiu liveras ĉiutage 5500 manĝojn en lernejnajn, maljunulajn kaj oficistajn restoraciojn. Ni mem devos revarmigi la pladojn, pretigi la tablojn, ktp. Ili estas viandenhavaj. Memzorgantoj rajtos uzi la komunan kuirejon.

Printempa
florado por
naturamikoj

Pri tranoktadoj: ne staras hotelo tuj ĉe la kastelo. Tial ni konsilas al eksteruloj rapide rezervi dormĉambrojn ĉe: Studyhôtel de apuda urbo Lormont <http://www.studyhotel.fr> Facile atingebla kaj ne tro kosta hotelo (ĉambro kun du unuopaj litoj: po 45,-€ nokte). Indiku ke vi rezervas nome de Esperanto-Gironde, se deko da ĉambroj rezervitaj, rabato proponota. Atentu: nepre mendu viajn matenmanĝojn ĉe la kastelo de la Diablo. Malpli kostas kaj la etoso estos freŝe verda jam frumatene!

Danteca
infero por
satanoj

Venu por kanti kaj danci: kun **KAJTO** kaj **LA KOMPANOJ** dum tri publikaj koncertoj sed ankaŭ dum privataj atelieroj. Venu amuziĝi per nekutimaj ludoj kaj animadoj.

Nuntempa strebo de la organizantoj: specialaj tagoj por laboristoj! Ni celas, ke laboristoj enskribiĝu en la unuaj oficialaj **SINDIKATAJ KLERIGOTAGOJ POR-kaj PER-ESPERANTAJ**. La 3a kaj 4a de majo estu por vi pagotaj tagoj ekster via laborejo krom viaj normalaj ferioj. Vi scias, ke en Francio ĉiu laboristo, dungita aŭ ne, sindikatista membro aŭ ne, rajtas partopreni en sindikataj klerigotagoj – *jours de formation syndicale* – (maksimume 12 tagoj ĉiujare). Kondiĉo: per speciala aliĝilo vi petu permeson al via laborejo almenaŭ unu monaton antaŭ la evento. Do antaŭ la 3a de aprilo 2018. Se konfirmota, interesatoj rekte ricevos la bezonatan formularon. Kun precizigoj konfirmote... aŭ ne! Ja ne nur ni decidus tiurilate.

+ Speciale
preparitaj
surprizoj

Ĉiuj informoj kaj aliĝilo elŝutebla ĉe esperanto-gironde.fr
@dreso: klodin@esperanto-gironde.fr